CONFEDERACIÓ GENERAL DEL TREBALL DE CATALUNYA
Comitè Confederal – Secretariat Permanent

Via Laietana 18, 9è, 08003 BARCELONA -Tel. 93 310 33 62 - Fax 93 310 71 10
Correu electrònic: spccc@cgtcatalunya.cat / spcccc@terra.es

Kontraŭ la EUa gvidlinio pri la deĵordaŭro ĝis 65 horoj

La Konfederacia Komitato de la CGT, reage al la gvidlinio pri ampleksigo de la labora deĵordaŭro ĝis 65 horoj semajne aprobita de la Prilaboraj Ministroj de la Eŭropa Unio, manifestas:

1. **La alfrontan kontraŭstaron de la CGT kontraŭ tiu ĉi mezuro**, kiu klopodas neniigi la atingaĵojn de la luktoj kaj depostuloj de la laborista klaso dum la lastaj 300 jaroj, kaj kiuj komence de la 20a jarcento atingis la konkeron kaj normigadon de la 40 horoj de semajna deĵordaŭro.

2. Ke tiu ĉi agreso supozas **gravegan atakon kontraŭ la laboraj kondiĉoj** de la laborista klaso entute kaj malprogreson de la socio, kiu kondukas nin al stato, similanta tiun de la 19a jarcento.

3. Ke tiu ĉi gvidlinio atencas rekte kontraŭ ĉia eblo harmonigi laboran kaj familian vivon.

4. Ke la aprobo de tiu ĉi gvidlinio ebligas generi la bezonajn meĥanismojn, por ke la mastraro povu neniigi la kolektivajn kontraktojn kaj prilaborajn rajtojn, tiel ke estu nur la individuaj gelaboristoj, kiuj intertraktos siajn laborajn kondiĉojn surbaze de la plej totala sendefendeblo.

5. Ke la CGT **daŭre postulas la deĵordaŭron de 35 horoj semajne** kiel iniciaton, kiu konduku al mezurojn pri disdonado de la riĉaĵoj kaj de la laboro cele al la socia justeco.

6. Ke, kiel Konfederacia Komitato de la CGT, ni alvokas la tuton de la laborista klaso, ties organizaĵojn kaj la Socion **kunflui ĉe la lukto kaj la mobilizado kontraŭ tiu ĉi gvidlinio** kaj kontraŭ kiu ajn simila mezuro de la EU, montranta esti subserve de la transnaciaj entreprenoj kaj la kapitalo.

7. Ke la tuto de la CGT laboros per ĉiu sia strecĥkapablo por kontraŭstari tiun ĉi gvidlinion eĉ kun la eblo **alvoki ĝeneralan strikon**.

Konfederacia Komitato de la CGT